tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

Aprilo 2023 / n-ro **141**

- La 11a kongreso de kroataj esperantistoj en Đurđevac
- La 20-a jubileo de la esperantejo en Vodnikova 9 en Zagrebo
- Kiu estas Ŭang Lujan- la tradukisto de la kroata verko ĉinen en 1931?
- Afrika esperantisto en Kroatio

Karaj legantoj

Saluton el la aprila **Zagrebo**. Kiel vi fartas?

En **Kroatio** estas preparata la 11a Kongreso de kroataj esperantistoj. Ĝi okazos en Đurđevac de la 30a de junio ĝis la 2a de julio 2023. Dum ni preparas ĉi tiun numeron de Tempo, al la kongreso aliĝis 72 kongresanoj. En Đurđevac la kongresanoj havos ankaŭ sian Jarkunvenon la 30an de junio 2023. Tie nun aperas libro de **Ivana Brlić Mažuranić** „Pratempaj rakontoj“. Ĝi havos sian prezenton en **Ogulin**, la urbo kie naskiĝis la granda kroata verkistino. Plena buso da esperantistoj veturas al la librofesto en **Ogulin** la 18an de aprilo, okaze de la naskiĝtago de la aŭtorino. Pri la kongresaj preparoj bonvolu legi la artikolon de la ĉeforganizanto **Josip Pleadin**.

En **Zagrebo** la teamo laboras pri la nova eldono de la Lernolibro pri Esperanto laŭ la Zagreba Metodo. Tio estas la 11a eldono en la kroata (el kiuj 10 eldonoj estis presitaj kaj unu presita per la brajla skribo).

Nia ejo en Vodnikova 9 atingis dudekjariĝon! Jam dudek jarojn ni posedas ĝin! La festo okazos la 10an de majo je la 19a horo! Dankon al ĉiuj kiuj kontribuis siajn financajn (aŭ laborajn rimedojn), kiu ebligis la posedaĵon.

Ĉar la jaro 2023 estas la 110a jubileo ekde kiam la instruistino en **Kostajnica Antonija Jozičić** publikigis en Esperanto la tradukon de la verko „La konfeso“ de la forgesita kroata verkistino **Milka Pogačić,** ni esploris pri la verko. La Esperanta libro veturis ĝis Ŝanhajo kaj tie ĝi estis tradukita ĉinen de ĉina esperantisto **Ŭang Lujan** kaj publikigita en 1931. Kiu estas la tradukisto? **Spomenka Štimec** sukcesis spuri lian vivon kaj prezentas la artikolon pri li ĉi numere.

Ekde la lastaj tagoj de la jaro 2022 en **Zagrebo** loĝas afrika esperantisto **Eric Nsabiyuma** el **Burundio**, kiu petis azilon en **Kroatio**. **Eric** bele vigligis nian Esperantan komunumon per la prelego pri **Afriko**. En Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ li ne nur prelegis pri Burundio sed ankaŭ enkondukis nin al la suahila lingvo. Li venigis al nia klubejo plurajn burundianojn por kiuj **Đivo Pulitika** instruas Esperanton ĉiun sabaton dum la monatoj kiam la afrikanoj atendas la decidon de la kroataj instancoj pri tio ĉu ili rajtos resti vivi en **Kroatio**. Ni laŭeble klopodas helpi ke ili fartu bone.

Eric Nsabiyuma prelegas pri suahila lingvo. Fotis Đivo Pulitika

Venis granda novaĵo: Universala Kongreso de Esperanto en 2024 okazos en **Aruŝa** en **Tanzanio** en **Afriko**. La unua Universala Kongreso de Esperanto en **Afriko** estas antaŭ ni! Bela novaĵo1

Esperanto-Societo Tibor Sekelj gastigis ne nur la afrikajn temojn: **Faruk Islamović** prezentis dek kvar etajn kroatajn riverojn la 8an de marto kaj **Bart Demeure** gvidis la kvizon pri scienco la 12an de aprilo 2023.

Kiuj estas ni, esperantistoj? Kion ni faras por Esperanto? Tio estis unu el la temoj kiujn traktis **Spomenka Štimec** kadre de la supera kursa en **St**. **Rapahël** okaze de Medieranea Esperanto-Semajno en februaro. En la fokuso de la progresiga kurso ĉefe estis la Esperanta literaturo. Ni publikigas ĉi numere kontribuon de **Arlette Duc Goninaz.** Ŝia filo **Philippe** esploris per sia kamerao la malmuntadon de la Esperanta kampadejo en Primošten en la okdekaj jaroj. Tiam li ankoraŭ trovis sur iu muro la vorteton „lavejo“.

Snježana Ivanović kontribuas ĉi numere per sia poemo.

Kvar novaj titoloj el la verkoj de **Tibor Sekelj** estis kroatigitaj de **Božidar Brezinščak Bagola** kaj prezentititaj en la kroata en la Kolekto de verkoj de la verkistoj el **Hrvatsko zagorje** *Zbornik*. Nun en la kroata legeblas la noveloj „La trovita feliĉo“ kaj „Facilanima virino“ kaj du poemoj „Miraklo“ kaj „

Samnumere estis prezentitaj “La savitaj vortoj” - la leteroj de **Hilda Dresen** al sia kroata amiko **Josip Velebit**. La tradukoj estis prezentitaj en Galerio *Antun Augustinčić* en **Klanjec** la 4an de marto kaj en Literarna hiša **Maribor** en **Slovenio** la 23an de marto 2023.

Oni diras ke ni ne multe faras por Esperanto lastatempe. Ĉu? Eble tamen?

S. Štimec

tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj.
Jaro XLIV (44), numero 141 (1/2023). ISSN 0352-1583. Sona numero 59/2023.
Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004. Voĉlegas Spomenka Štimec. La reta versio de Tempo ĉe www.esperanto.hr/tempo_kel.htm

Redakcio/Uredništvo; **Eldonisto/Izdavač:** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; kel@esperanto.hr, www.esperanto.hr; IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Vanda Bralić, Božidar Brezinščak Bagola, Arlette Duc Goninaz, Philippe Duc Goninaz, Saša Đukić, Gu Ĝijing, Nikolao Hohlov, Faruk Islamović, Snježana Ivanović, Eric Nsabiyuma, Anto Mlinar, Josip Pleadin, Monique Preciozo, Đivo Pulitika, Judita Rey Hudeček, Željko Saks, Zdravko Seleš, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Sur la titolpaĝo: Đurđevac (Foto: DEC)

LA MAGIA NUMERO 11

La ĉi-jara kongreso de kroataj esperantistoj okazos en la signo de la numero 11. Ĝi estos la 11-a laŭvice, kaj inter la pasinta kaj la nuna kongresoj pasis – 11 jaroj! Per tiu numero komenciĝas ankaŭ la nova deko en la serio de niaj kongresoj, sed ĉu malfermiĝos ankaŭ novaj perspektivoj por tiu aranĝo? Pri tio diskutos la kongresanoj en Đurđevac inter la 30-a de junio kaj la 2-a de julio 2023.

La 11-an kongreson organizas Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac kiu organizis ankaŭ la 10-an en Koprivnica, danke al la decido de Kroata Esperanto-Ligo akcepti la solan kandidaton por ĝia organizado. Sian aŭspiciadon anoncis Urbo Đurđevac kaj Departemento Koprivnica-Križevci. En la unua aliĝperiodo aliĝis jam ĉirkaŭ 80 kongresanoj, kio anoncas sufiĉe belan aranĝon! Ni amike invitas kaj atendas ankaŭ vin, kiuj ankoraŭ ne aliĝis! Ju pli da ni kunvenos, des pli agrable ni fartos kaj des pli belan mesaĝon ni sendos al niaj aŭspiciantoj kaj al la urbo-gastiganto! La statuso de Esperanto kiel nemateria kultura havaĵo en nia lando certe meritas kaj postulas tion!

De diversaj flankoj venadis plendoj, ke malmultiĝis similaj, malgrandaj aŭ mezgrandaj aranĝoj por esperantistoj. Inter kroataj esperantistoj regas la opinio, ke nia kongreso povus fariĝi ne nur nacia, sed ankaŭ internacie alloga kunvenejo de esperantistoj. Tio nun estas tre klara kaj realigebla celo! Subtenu ĝin! Subtenu la kongreson per via alveno, kontribuu en la programo kaj donacu al la kongresa kaso, ĉar viaj donacoj ebligos venigi al la kongreso ankaŭ tiujn esperantistojn, por kiuj la kongresumado kun ni pro la financaj problemoj alimaniere estus neebla!

Kvankam la kongresa programo ankoraŭ ne estas finpreparita, jam nun la organizantoj proponas al vi diversajn ĝuindaĵojn! Vendredon, la 30-an de junio, kiel anoncas aliĝoj de la asembleanoj de KEL, okazos verŝajne la plej kompleta jarkunveno de KEL dum la pasintaj jaroj. Post la jarkunveno ni organizos eble la plej gravan strategian eventon, la rondan tablon pri „Stato kaj perspektivoj de Esperanto en Kroatio”, dum kiu finfine ĉiu el vi prezentu proprajn opiniojn por plibonigi la funkciadon de nia enlanda movado, kiu nun havas ne nur taskon mem organiziĝi, sed ankaŭ prizorgi la „Tradicion de Esperanto” kiel nematerian kulturan havaĵon de nia lando. Superfluas skribi, ke nur kunlaborante ni povas progresi!

Sabate vi povos spekti varian kulturan programon, kiu estos la momento por nia prezentiĝo al la Esperanta, sed ankaŭ al la ekstera (nacia) publiko. Do ĝi estu digna kaj riĉa! Se vi ne povas partopreni la tutan kongreson, nepre elektu sabaton por unutaga veno al Đurđevac! Sabate posttagmeze ni kolektiĝos ĉe la Domo de DEC por finfine starigi la novan memortabulon kun la meritplenaj nomoj de niaj helpantoj en la konstruado de tiu grava centro de Esperanto en Kroatio. Tiutage ni oficiale malfermos ĝin al la nacia publiko! Ne maltrafu esti kun ni! Ne maltrafu vidi kia progreso okazis ĉi tie post nia pasinta renkontiĝo en septembro 2019!

Dimanĉe ni leĝere ekskursos en la regiono de Virovitica, vizitonte du gravajn nobelajn kastelojn (Suhopolje kaj Virovitica) kaj la naskiĝdomon de la granda kroata verkisto Petar Preradović en Grabrovnica.

Inter ĉiuj menciitaj programoj ni trovos multe da tempo por interparoli kaj amikumi, aparte dum la vendreda interkona vespero en la Ĉasista domo.

Alportu al Đurđevac vian bonvolemon, amikemon, kunlaboremon, entuziasmon kaj multe da toleremo! Pripensu ankaŭ kie ni kongresu dum estonta(j) jaro(j). Ju pli ofte ni renkontiĝos, des pli abunde kreskos nia ideoj kaj nia Esperanta komunumo!

Bonvenon al Đurđevac!

Josip Pleadin

Prikongresajn novaĵojn sekvu en nia retejo:
https://novo.dec-kroatio.hr

Kiu estis **Ŭang Lujan**, la tradukisto kiu ĉinigis ***Konfeson*** de Milka Pogačić?

Pri la ĉina tradukisto kiu tradukis la unuan verkon el la kroata al la ĉina „Konfeso“ de **Milka Pogačić** ni ne sciis multon. Nun montriĝis ke pri li raportis lia kuzino por „El Popola Ĉinio“ en la jaro 1987. La kuzino nomiĝis **Gu Ĝijing**. La artikolon ni trovis en la esperanta biblioteko de Kroata Esperanto-Ligo en **Zagrebo**.

„**Ŭang Lujan** estas mia kuzo, la filo de la frato de mia patrino. **Ŭang Heng** estis lia antaŭa nomo kaj **Lujan** lia plumnomo. Li naskiĝis en 1901 kaj estis pli aĝa ol mi je ok jaroj. Lia familio estis malriĉa, ĉar mia onklo estis ordinara komizo, tial li ne povis fini sian studon en elementa lernejo. Tamen li estis saĝa, diligenta, lernema kaj genia en muziko. En sia infaneco li ellernis ludi bivon kaj erhuon (ĉina dukorda muzikilo ludata per arĉo). Mi ŝatis la de li luditan malĝojan muzikon jam de infaneco. En sia 17-18-jara aĝo li forirs de sia hejmloko **Ningbo** por lerni metion en **Ŝanhajo** kaj de tiam li ekmigris foren por la tuta vivo.

En la sekvonta jaro, post kiam **Lujan** veturis al **Ŝanhajo**, mia patro, fameta ĉina kuracisto, kune kun mi veturis al **Pekino**, por tie labori. Post kiam ni ŝipveturis en **Ŝanhajon**, mia kuzo kune kun ni trajne veturis al **Pekino** kaj loĝis en la sidejo de la Samlokana Ligo de **Ningbo**. Mi ekvizitis la elementan lernejon dum **Lujan** partoprenis en la labora-lerna interhelpa societo kaj ĉeestis al la lekcioj en la **Pekina** Universitato. Mi ne scias, ĉu li eklernis Esperanton en **Ŝanhajo**, tamen estas certa, ke li neniom sciis fremdan lingvon antaŭ la metilernantiĝo. En **Pekino** lia modesta vivo tute dependis de lia laboro, sed estas mirinde ke li ellernis Esperanton en malpli ol duonjaro, en la **Pekina** Universitato.

En 1921, pro neadaptiĝo al la malvarma klimato en la nordo mia patro veturis al **Ningbo**. Mi restis kune kun mia kuzo en la loĝejo de la Esperanta loĝejo en **Pekino**, kie loĝis multaj esperantistoj kaj

Erošenko (staranta kun bastono), Ŭang Lujan (maldekstre staranta) kaj aliaj ĉinaj esperantistoj en 1923 (El “El Popola Ĉinio” 3/1987)

Erošenko kun s-ino Alexander en 1915 kiam li interesiĝis pri la bahaa kredo. (El “Literatura Foiro” 4/2016)

progresemaj gejunuloj. Mia kuzo inklinis al nova pensfluo. Tiutempe oni proponis ke la knabinoj portu mallonge tonditan hararon, tamen mi ŝatis mian longan harligon kaj rifuzis lian admonon. Li do postkuris min, kaj kaptinte min, fortondis mian karan harligon. Kvankam mi ploris de tio, tamen de tiam mi ne portis plu longan harligon.

Mia kuzo estis bone klerigita dum li ĉeestis al la lekcioj de **Lusin** en la **Pekina** Universitato. Krome li havis plian kontaktiĝon kun sinjoro **Lusin**, tial li poste fariĝis fama verkisto kaj tradukisto.

En 1922 kaj 1923 rusa blinda poeto **V. Eroŝenko** instruis Esperanton en la pekina Esperanta lernejo. Mia kuzo funkciis kiel lia asistanto kaj interpretisto. La humanisma ideologio de **Eroŝenko** grave influis mian kuzon. Tio pliigis lian amon al Esperanto kaj plifirmigis lian decidon sin dediĉi al ĝi. La laboro ĉe **Eroŝenko** multe levis lian Esperantan nivelon. Li elesperantigis multajn eminentajn literaturaĵojn de **Rusio** kaj **Orienta Eŭropo** en la ĉinan lingvon, kiaj „Hebreaj Rakonto“, „Noveloj“ de **H. Sienkiewicz**, „Portreto“ de **V. Gogol** de **Rusio**, „Konfeso“ de **Kroatio**, „Kolekto de Mondaj Noveloj“ k.a. Li multe kontribuis al la kultura interŝanĝo de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj al la Esperanto-movado kaj ankaŭ al la disvovliĝo de la nova literaturo de Ĉinio.

V. Eroŝenko estis tre favora al la ĉina Esperanto-movado. Tiam li ĉiutage rikiŝe veturis al la Espernata lernejo kaj mi helpis al li en la sur- kaj derikŝiĝo. Iafoje mi ankaŭ kun li ekskursis aliloken. Tiam **Lujan** estis nur pli ol 20-jara, dum **Eroŝenko** pli aĝa ol li je ĉ. 10 jaroj. **V. Eroŝenko** estis altstatura kun longaj helflavaj bukloj kaj lipharoj. Malgraŭ liaj sulketoj sur la frunto kaj cerbumanta mieno, li ĉiam estis afabla kaj rideta. Liaj bluaj okuloj senĉese moviĝis, tial estis malfacile rimarki lian blindecon. Li en malnovaj simplaj vestoj estis nek fumema nek drinkema. Li simple vivis kaj ŝatis nur tomatojn kaj terpomojn. Tagmeze mi kaj **Lujan** akompanis lin tagmanĝi en Esperanta lernejo. Mi scipovis nur simplan Esperantan konversacion, tial mi ne povis flue paroli kun li same kiel mia kuzo. Li ja sincere prizorgis min. Lia dolĉa rideto, specialaj

gestoj, varmeta mano karesinta mian kapon, ĝis hodiaŭ klare restas en mia memoro.

Same kiel mia kuzo, **V. Eroŝenko** estis pasia pri muziko. Portante sian bivon **Lujan** migradis aliloken, dum **V. Eroŝenko** ĉiam portis sian liuton, similan al la ĉina bivo en la formo. La de ili luditaj melodioj estis same malĝojaj. Iuvespere, nelonge post la atingo de la Esperanta lernejo, portante sian liuton li veturis, kune kun rikiŝo, al la Dua Civitana Vesperlernejo por ĉeesti amuzan vesperon. Kiam komenciĝis la programo, li atente aŭskultis kun viglaj okuloj. Pro emociiĝo, li suriris sur la podion, kaj mem ludis sian muzikon kaj bele kantis. Dimaĉe li, mia kuzo kaj mi kune vizitis parkojn kaj la pitoreskejojn en la okcidenta montaro de **Pekino**.

Post unujara instruado en la Esperanta lernejo, pro nostalgio **V. Eroŝenko** forlasis **Pekinon** kun sia muzikilo. Ankaŭ mia kuzo foriris de **Pekino** en la somerfino aŭ en aŭtunkomenco de 1923. Li ĉie migradis kaj perdis kontaktojn kun mi kaj liaj familianoj de la hejmloko. Oni diris al mi, ke en 1933 li revenis al sia hejmloko. Tamen, mi ne vidis lin, ĉar tiam mi jam edziniĝis kaj loĝis en la insuleto de Ĝoušan-insularo. Post aliaj pli ol dek jaroj, mi eksciis el malnova ĵurnalo, ke li mortis de malsano en 1944 en la urbo **Gujlin** de **Ĝŭangŝji**. Mi informiĝis ankaŭ, ke li ĉiam persiste propagandis kaj disvastigis Esperanton en malfacilego kaj mizero. Estis korŝire por mi, ke la longtempa malriĉeco kaj pulmomalsano forrabis lian vivon.

Post mia disiĝo kun **V. Eroŝenko** en **Pekino**, mi neniam plu aŭdis pri li. Mi ĉiam profunde sopiras al tiu sincera amiko de ĉina popolo. Ĉiufoje kiam mi memoras mian kuzon, liaj paroloj kaj kaj ridetanta vizaĝo ekŝvebis en mia memoro. Sovetia ĉinologo **Aleksandr Aleksandrovič Dragunov**, kiu multjare laboris en **Ĉinio** antaŭ la liberiĝo de nia lando kaj sin okupis pri esploroj pri **Lusin**, plufoje skribis al mi de 1956 ĝis 1960, informiĝinte ke **Lujan** estis mia kuzo. En 1960 li sendis al mi foton de **V. Eroŝenko**, **Lujan** kaj aliaj ĉinoj. En sia letero li diris ke la foto estis trovita en la antaŭa loĝejo de **V. Eroŝenko** en **Ukrajno**. Li petis min sciigi lin, kie oni faris tiun foton kaj kiuj estas la homoj sur la foto. Mi tuj respondis. En la foto, **V. Eroŝenko** kun modesta mallonga surtuto staras en la mezo kaj ambaŭflanke de li staras dek homoj ĉiuj en roboj. Bedaŭrinde, mi ne kopiis la foton. Tio estis la unua fojo por mi vidi la foton de mia kuzo kaj **V. Eroŝenko**, post 37-jara disiĝo kun ili.“

Gu Ĝijing

La titolpaĝo de la Japana esearo pri Erošenko publikigita en 2015 okaze de la 125a jubileo de la aŭtoro.

ESPERANTISTOJ CELEBRIS LA NASKIĜTAGON DE LA VERKISTINO I.B. MAŽURANIĆ

Kvardeko da esperantistoj el la tuta **Kroatio** (kaj eĉ unu el **Burundo** kaj unu el **Francio**) vizitis la 18-an de aprilo **Ogulin**, la naskiĝlokon de la fama kroata verkistino **Ivana Brlić Mažuranić**. La viziton al la naskiĝdomo de Ivana organizis Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, kaj la ĉefa programero estis la promocio de la Esperanta traduko de la libro *Priče iz davnine* (*Pratempaj rakontoj*).

Foto: DEC (Foto IN)

La libron eldonis Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac. La kuneldonisto estas Esperanto-societo **Rijeka** kiu kune kun Urbo **Ogulin** financis la eldonon. La rakontojn tradukis **Josip Pleadin**, **Zdravko Seleš** kaj **Milica** kaj **Ante Gropuzzo**.

La programo de promocio komenciĝis per la enkonduka vorto de **Tihana Turković**, direktorino de la *Fabeldomo de Ivana* en **Ogulin**. Sekvis salutvorto al ĉeestantoj de **Dalibor Domitrović**, la urbestro de **Ogulin**. Post tio verkistino **Božica Jelušić** tre imprese rememoris pri **Ivana** okaze de ŝia naskiĝtago.

Zdravko Seleš, profesoro el Đurđevac recitis poeziaĵon *Našoj baki Ivani* (Al nia avino Ivana) kiun li verkis en la jaro 1991 kroate kaj Esperante. **Josip Pleadin** prelegis pri la ekesto de la libro.

Pri la libro parolis, parte legis kaj komentis **Josip Pleadin** kaj **Zdravko Seleš**. Fine la membroj de la **Bjelovara** teatro prezentis fragmenton el la teatraĵo Šuma Striborova *(La arbaro de Stribor)*. Per granda aplaŭdo la publiko esprimis sian kontenton aparte pro bonega aktorado de infanoj, membroj de la teatro.

Sekvis dankesprimo al la partoprenantoj de tuta projekto kaj disdonado de la libroj. La programon konkludis komuna fotado antaŭ la Fabeldomo de Ivana.

Antaŭ ol ni forlasis la fabeldomon, estraranino de Kroata Esperanto-Ligo *Ankica Jagnjić* parolis pri traduko Esperanten de la romano Ĉudnovate zgode šegrta *Hlapića* (*Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić*) kiun tradukis **Maja Tišljar** en la jaro 1998. Tiun tradukon utilis kiel pontolingvoj la tradukantoj el Aziaj lando.

La programon daŭrigis amikumado kaj tagmanĝo en hotelo. La partoprenantoj forlasis **Ogulin** antaŭvespere kontentaj kaj bonhumuraj.

Anto Mlinar

MOR - poeta duoblulo de Sudeta

Đuro Sudeta
MOR
Fantasta rakonto
Bjelovara esperantista societo, Bjelovar, 2022
tradukis Zora Heide

Kroata verkisto **Đuro Sudeta** naskiĝis la 10-an de aprilo 1903. en la vilaĝo **Stara Ploščica** proksime de **Bjelovar**, kaj servis kiel instruisto en la vilaĝo **Virje** ĉe **Đurđevac**. Same kiel lia vivo, lia instrua kariero malongis: ftizo lin gvidis en sanatorion kaj en malsanuleojojn, tiel ke la 30-an de aprilo 1927 li mortis en la malsanulejo en **Koprivnica**. La malsano markis lin ne nur korpe, sed ankaŭ lia poezio estas tute signita de mornaj, malĝojaj, krepuskaj sentoj, kiujn en li nature naskigis doloro de juna homo scianta sian mortoverdikton. Dumvive li publikigis du poemarojn „Osamljenim stazama“ (*Laŭ la solecaj padoj“)*, 1924. i „Kućice u dolu“ *(Dometoj en la valo),* 1926. Postmorte estis publikigitaj poemaro „Sutoni“ *(Krepuskoj),* 1929. kaj fantazia rakonto/eta romano „Mor“, 1930. **Sudeta** ne estas verkisto de la forta poeta gesto: lia esprimo estas kvieta, ŝajnas ke li hontas pro sia doloro kaj malforteco, sed tamen li devis ilin eldiri. Li sian plorkanton ne eldiris kiel tielnomitan romantisman mondan doloron – sufero de lia junaĝo estas vera.

Simile oni pri **Sudeta** skribas kaj parolas tuttempe. Tiel **Slobodan Prosperov Novak** en sia „Povijest hrvatske književnosti“ *(Historio de kroata literaturo*, libro 2-a, en la teksto „Kako se Đuro Sudeta opraštao od života“ *(Kiel Đuro Sudeta adiaŭis de la vivo)* parolas pri antaŭsentoj de venado de la amikino morto kaj pri tio ke la poemaroj de nia poeto estas „taglibroj de aŭtora mortado“ kaj diras: „Malmultaj kroataj poetoj kun tia obsedo poemumis malĝojon de la adiaŭo kun la vivo kaj malmultaj en tiaj poemoj scipovis konservi konfideman tonon de pia cedemo.“

Tamen, instigita per ekzistado de unu alia **Sudeta**, kritikema, humorismema kaj eĉ ema al satiro, mi provas aldone konsciigi iujn elementojn kiuj iamaniere restis vualitaj en la verkoj de **Sudeta**. Se ni observas, ekzemple, unu el la plej konataj poemoj de **Sudeta** „Čežnje i bolestan mladić“ – „Sopiroj kaj la malsana junulo“, ni vidos ke la plejparto de niaj legadoj kaj interpretadoj de ĉi tiu poemo fokusiĝis al la titola adjektivo malsana. Tamen, la unua, kaj mi dirus, pli grava vorto en la titolo estas sopiroj. La poemo plenplenas de verboj – eĉ de u-modoj kaj de krisignoj – kaj la tuta direktas al la ekstera mondo, al la vivo, kiu, bedaŭrinde, transiras apud la poeto. Kompreneble, la konkludo, al kiu venis la poeto en kelkaj poemoj, estas la bezono de akordigo kun faktoj de destino, precipe kun la lasta fakto. Laŭ siaj eduko kaj mondrigardo **Sudeta** akceptas neeviteblecon de la morto, eĉ, se ni kiel konkludan prenus la poemon „Ti koji si sklopio cvijeću zlatne vlati“ („Vi kiu kunigis al la floroj orajn kulmojn“), en kiu li alparolas Dion direkte

„Ci kiu fermis al la floroj orajn kulmojn,
silentigis murmoron de l’ rojo en kulmaro
kaj susuron de branĉoj

kaj dolorojn de tiuj kiuj dum tagoj suferas,
kompatu min, malsupreniru, kaj min vizitu.
(…)
kompatu min, bona, kaj al mi venu
kaj per sia kvietiga, nevidebla mano
fermu por ĉiam ĉi okulojn miajn!“

tiam ni povas paroli pri „la amikino morto“. Tamen, la morto estas nun eliro el la turmentoj de la malsano, kaj la poeto vere estas junulo sopiranta pri la ĝojoj de la vivo; li rimarkas VIVON en ĉiu guto, ĉiu herbeto, en la movo de la folio kaj ŝanĝo de koloro, ĉar ĉiuj tiuj okazaĵoj estas manifestiĝoj de la vivo. Ditirambaj sentoj de **Sudeta**, lia amo por la naturo, estas la reala bildo de lia estaĵo, de tio kion li povis kaj deziris se ne ekzistus – se ne ekzistus lia malsano. Do, la juna homo TAMEN ne pensas ke tio justas, li deziras forton de la juneco, kaj ne la saĝon de la maljuneco kiu interpaciĝas kun la morto. En la poemo „Pred polazak“ („Antaŭ ekiro“), en kiu li priskribas foriron al la malsanulejo, kaj komencas per versoj:

„ Kaj denove vojo! Ĉu mi denove vojaĝas?
Al nokto? Al tago? Al la kvara klaso,
al ia malvarma kaj frosta malsanulejo?“

malakcepto kaj protesto kontraŭ fato videblas en la reago al rigardoj de la preterpasantoj kiuj rimarkas lian staton, kiam li diras;

„Ho, tio doloras - doloras!
Kaj mi ne volas ke ili sciu ke mi malsanas!“

Iom antaŭ **Sudeta**, en la sama regiono naskiĝis poeto **Fran Galović**, kiu preskaŭ ĉiam rigardis al la transmondo, opsedita de nekonato situita malantaŭ limo trans kiu neniu revenis; li rigardas tiadirekten, sed la rigardo de **Sudeta** volas alidirekten. Sudeta sopiras vivon mirante pri tio iamaniere eĉ mem, kiel li diras en la poemo „Slutnje“ („Supozoj“)

„Kial oni hodiaŭ suferas,
Ĉar oni suferos denove,
Kial, dum homo mortas,
Li havas tiom da sonĝoj?“

Kaj tiam tie eliras duoblulo de **Sudeta**, lia vera estaĵo, la estaĵo havanta forton kaj povon de la junaĝo. Eble tiel oni povas legi la fantazian rakonton „MOR“. Rakonto pri **Mor**, sensitiva kaj

sentema junulo kiu kamaradas kun la arbaro kaj ĝiaj loĝantoj, kiu komprenas lingvon de bestoj kaj al kiu muro de la realeco malhelpas realigi sian amon al la nobela filino, estas interpretita kiel "intima historio de senespera amo de **Sudeta** maskigita per la poeta fantastiko", kiel himno al la naturo, kaj oni parolis anakŭ ke inspiris lin **E.T.A. Hoffmann** aŭ/kaj **Knut Hamsun**. Ekzistas en ĉiuj tiuj asertoj iom da vero, kvakam la plej malmulte en ĉi lasta."Mor" estas, nome, la verko de profunda persona inspiro; ĝuste profunda ĉar ne temas pri la simpligita fabula fundamento; vivo de **Sudeta** ne estas la konstrumaterialo de la rakonto. „Mor" estas, evidente, la verko de kompleksa inspiro, same kiel ĝi estas ĝenra „miksaĵo". Nome, „maldika" kaj simpla realisma rakonto estas rakontita en la potenca (!) lirika stilo, kaj apartecon al ĝi donas elemento de la fantastiko – metamorfozo de **Mor** al likantropo, metamorfozo kiu sian ekeston ŝuldas al la popola tradicio. Tiel ekestis novelo kun la forta kontraŭmaterialisma kaj ekologisma akcento, en kiu fantastiko ekestas (ne la unuan fojon en la beletro!) ia loko por almenaŭ parta efektivigo de la justo. Nome, **Mor** malgajnas, sed la naturo tamen venkis transforminte lin al la estaĵon de la naturo.

Ne ekzistas, do, ia simpla kaj rekta aŭtobiografieco en ekesto de la rakonto, sed tamen ĝi estas iu speco de alternativa biografio de **Sudeta**, kiel en „Stepa lupo" aŭ „Ludo de vitraj perloj" de **Hesse**. Temas pri tio ke **Mor** povus esti duoblulo de **Sudeta**, ke la rakonto pri **Mor** povus esti vivhistorio de **Sudeta** en iu alia dimensio, en dimensio kie la animo estus la sama; akceptebla por ĉiujn tremetoj de beleco kaj bono, sed la korpo havus forton kaj potencon eldiri sian ribelon kontraŭ la mondo kiu ne agnoskas la amon kaj la belecon, kiu detruas ĉion kio estas vertikalo de vera mondo.

Tamen, kiel ajn ni interpretu „**Mor**", tio malpli gravas ol ĝin tralegi kaj sperti, kaj tial mi ĝojas pri ĉi tiu traduko de **Zora Heide** kaj sendo de la libro en Esperantan kulturan medion. Temas, nome, pri unu el la plej belaj rakontoj de la kroata literaturo, kies valoro ne estas en la interpretoj kaj kritikaj simpligoj, sed en la magia beleco de poeta ritmo kaj en la streĉiteco de sekreto kaj tragiko, kiuj ensorĉas ĉiun leganton.

Kaj ravos la leganton, antaŭ ĉio, tiu sekreta Mor – tiu duobla estaĵo, primitiva estaĵo de sopiro, al **Sudeta** la plej simila en sia lirikeco, do en sia doloro: „Li tutsekure estis tre malfeliĉa. Kiel homo. Tiel kiel nur li ofte estas. Kiam li mortas, kaj volus vivi; kiam li amas, kaj volus forgesi." Tial en la poeta legado ni povas diri ke **Mor** estas poeta duoblulo de **Sudeta**. **Sudeta** ŝatas sentemon de sia estaĵo kaj donacas ĝin al **Mor**, sed dezirus de li ricevi lian potencon de juneco kaj naturo. Tamen, "Li ne estas **Mor**. **Mor** estas sonĝo, li estas malĝojo malantaŭ la arbo." – Mor estas, do, nur sonĝo de **Sudeta**, sed la malĝojo al ili estas komuna.

Zdravko Seleš

Aperis du tradukoj el prozo kaj du el poemoj de Tibor Sekelj en la kroata

En la urbeto **Klanjec** en **Hrvatsko zagorje** en la eleganta galerio de la fama kroata skulptisto **August Augustinčić** estis la 4an de marto 2023 lanĉita la kolekto de la prozo kaj poezio de la verkistoj kiuj verkas en **Zagorje**. Unu parto de la kolekto estas dediĉita al la lastatempaj tradukaj laboroj. Inter ili estis prezentitaj la tradukoj al la kroata el Esperanto.

Temas pri la noveloj de **Tibor Sekelj** *Facilanima virino* kaj *La trovita feliĉo*. kiujn kroatigis **Božidar Brezinščak Bagola**. En la sama kolekto estis ankaŭ prezentitaj du poemoj de Tibor Sekelj *Miraklo* kaj *La savitaj vortoj*. *La trovita feliĉo* estas la unua libroforma eldono de Tibor Sekelj publikigita en **Bonaero** en Argentino.

En la sama kolekto **Spomenka** Štimec prezentis en la kroata la adapton de la tradukoj de la leteroj de **Hilda Dresen**, la konata estona Esperanto-poetino (1896-1981) al la kroata poeto, tradukisto kaj esperantisto **Josip Velebit** (1911–2000).

La verkoj estis prezentitaj ankaŭ en **Maribor** en **Slovenio** en Literarna hiša**,** la 23an de marto 2023.

S.Š.

Verkistoj dum la prezento de novaj tradukoj en la Galerio de Antun Augustinčić en Klanjec. Fotis Božidar Brezinščak Bagola.

Afrika esperantisto-azilpetanto en Zagrebo

Prezentante min al gelegantoj, mi unue intencas laŭte esprimi miajn dankemojn al ĉiuj geesperantistoj kroataj, ĉar dank' al ili al mi nenio mankis en Zagrebo. Mia koro estas plena je neesprimeblaj emocioj pro tio. Mi nomiĝas ***Eric NSABIYUMVA***, mi estas afrikano el **Burundo** kaj ekde la 30-a de novembro 2022 mi estas en **Kroatio** kiel azilpetanto. Mi estas edzo kaj patro de du knabetoj kiuj vivas en mia lando. Mi ekesperantiĝis en 2008 per la lernolibro "Zagreba Metodo".

Kial forflugi ĝis Zagrebo?

Mia lando ekde 2015 trapasas malhelan periodon pro la politika malstabileco. Mi klopodis esti fore de ĉiuj problemindaj situacioj. Tio eblis ĝis la jaro 2022 kiam rezultoj de miaj projeketoj aproksimigis min al lokaj geloĝantoj kies plimulton mi helpadis diverskadre laŭ mia rimedo. Tial estroj de rega politika partio en mia provinco kaj ties armitaj junuloj nome ***Imbonerakure*** kuniĝis kaj decidis persekuti min.

Ili torturis min kiel averto al mia mortigo se mi ne fleksiĝus al iliaj postuloj, mia edzino kaj mi mem decidis ke mi fuĝu el la la lando. Tiel mi unue forflugis al **Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj**. Post tri semajnoj da tiea travivado, mi konstatis ke la vivo ne estis eltenebla. Mi turniĝis al **Eŭropo**. Mi eksciis ke **Serbi**o havis la senpagan vizan interkonsenton inter ĝi kaj **Burundo**. Tiam mi ekflugis de **Buĵumburo** al **Adis-Abebo** de tie al **Istanbulo** ĝis **Belgrado**.

De Belgrado al Zagrebo

La polico ekspedis nin al **Tutin,** la urbeto en la sudokcidenta **Serbio.** Post unu monato kaj du semajnoj en **Tutin** mi konstatis ke **Serbio** ne respektas la homajn rajtojn kaj tuj decidis serĉi iun landon, kie mi povas senti min trankvila kaj konsiderata kiel homa estaĵo kun ĉiuj indecoj.

Tiam komenciĝis malfacila vojaĝo: mi eliris el **Serbio** al **Bosnio** transirante riveron kaj marŝante nokte tra arbaroj. Poste de **Bosnio** al **Kroatio** mi piedmarŝadis dum kvin tagoj ĉirkaŭ 120 horojn tra arbaroj kun granda soifo, malsato kaj laceco. Kun granda ŝanco mi sukcesis atingi kroatan policopatrolon. Post klarigoj kaj kontrolo, la policistoj forveturigis min al proksima policejo. Mi devis prezenti miajn fingrospurojn kaj oni akceptis min oficiale kiel azilpetanton. Mia koro senpeziĝis.

Tuj kiam mi alvenis en Zagrebo

Mi unue kontaktis rete Kroatan Esperanto-Ligon**. Spomenka Štimec** senprokraste respondis favore al mia peto renkonti geesperantistojn, Tuj ŝi sendis al **Dugave** sinjoron **Sinŝan**, kiu gvidis min kun du burundanojn de **Dugave** al **Vodnikova 9** kie oni varmkore akceptis nin kaj igis min forgesi ĉiujn aĉaĵojn prisuferitajn freŝdate. Verdire **Spomenka** fariĝis esperobrileto por mi. Ŝi organizis por mi prelegojn en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj". Alvenis trideko da geesperantistoj kiuj fariĝis mia familio. Ĉiu diversomaniere kaj laŭvice proponis kaj disponigis al mi ĉiun ajnan helpon poveblan.

Mi ŝuldas multajn dankojn al sinjorino **Ankica** kiu plurfoje zorgardas pri mia integriĝo al la kroata medio per kafumado, subtenado, promeno, invitoj al tagmanĝoj interfamilianaj, al kulturaj festadoj, prezentado al siaj geamikoj.

Same estas mi tre dankema al sinjorino **Judita** kiu persone helpadis min kaj konektis min al sia filo sinjoro **David**; kia afabla kaj helpema estas li! Li manĝigis min en iu altevalora restoracio kaj finance subtenis.

Sekve, mi ne forgesus afablecon, sindonemon kaj helpemon de sinjoro **Neven** kiu vespermanĝigadis kaj ekskursigis min kaj pluhavas li bonan intencon al mi.

Tutegale, mi mencius sekvajn gesinjorojn: ***Krunon, Ĝivon, Mladenkan, Brankan, Darinkan, Tinan, Bojan, Denis…*** mi neniam forgesos vin**.**

Fine mi dankas al ĉiuj organizaĵoj kiuj zorgas diverskadre por la plibonigo de vivkondiĉoj de rifuĝantoj en **Kroatio** interalie: ***Jezuita Servo, Ruĝa Kruco, Centro por Pacaj Studoj, Are you Sirious, Borders None*** kaj tiel plu.

Eric Nsabiyumva

Eric Nsaiyumva prelegis en ES "Tibor Sekelj"

Eric Nsaiyumva, mezlerneja instruisto pri lingvoj el **Burundo**, tre bona parolanto de Esperanto, prelegis pri sia vojaĝo de **Burundo** al **Kroatio**. Li alvenis al **Kroatio** en decembro 2022 kaj la 28an de decembro kontaktis Kroatan Esperanton-Ligon. Kun plezuro ni invitis lin al niaj ejoj en Vodnikova 9 por konatiĝo kaj proponis ke li prelegu en la Esperanto-Societo" Tibor Sekelj" pri sia lando kaj pri sia vivsituacio. La prelego okazis la 11an de januaro 2023. Dudeko da zagrebaj esperantistoj aŭskultis lin. La prelegon organizis kunlabore Kroata Esperanto-Ligo kaj "Tibor Sekelj". La publiko povis tre bone informiĝi kion signifas veturi de Afriko al Eŭropo por eviti persekuton: flugo, de **Addis Abeba** ĝis Istambulo, poste la flugo al **Beograd** en **Serbio**, kiu senvize

Eric Nsabiyuma kun la membroj de E-societo "Tibor Sekelj". Fotis Đivo Pulitika

akceptis burundianojn tiutempe. Tie komenciĝas granda peno trovi similsortanojn kiuj serĉas vojon eliri el sia malfeliĉo. Li trovis 15 burundianojn kiuj formis grupon kiu ekiris tra arbaroj kaj riveroj. Ili piedis kvin tagoj tra arbaroj de la lando **Bosnio kaj Hercegovino**… ĝis la polico kaptis ilin kaj reveturigis ĉiujn al **Serbio**, tien kie oni komencis piediri. Tiam komenciĝas la nova kalvaria vojo… ĝis oni iutage renkontis la kroatajn policistojn kaj klarigis ke oni ŝatus peti politikan azilon en **Kroatio**. Tiam la policistoj direktis ilin al Centro por azilpetantoj **Porin** en la zagreba urboparto **Dugave**. De la polico li ricevis sian legitimilon de azilpetanto. Dum la venontaj ses/dekdu monatoj li esperas ricevi respondon de la ŝtataj instancoj ĉu pozitive aŭ negative estas solvita la peto pri la azilo en **Kroatio**. Kiel azilpetanto li ne rajtas labori…

– Kaj la rivero? – demandis la publiko kompateme.

La rivero ĝis ĉi tie, montris Eric meze de sia femuro.

Ni ĉiuj ĝojis ke **Eric** kaj ni estas en la seka kaj varma ĉambro. La publiko alportis donacetojn por **Eric** kaj kun simpatio aŭskultis pri lia edzino kaj liaj du filetoj kiujn li ŝatus revidi.

La afrika vespero alproksimigis nin al la problemo de azilpetantoj. **Eric** ne estis kompatinda rifuĝinto, sed instruisto kiu instruis nin pli bone kompreni la gravecon de la instancoj helpantaj rifuĝintojn. Ni ĝojis ke la kroata polico en la rakonto de **Eric** havis pozitivan rolon. Kaj Esperanto ne estis nur verso pri rondo familia sed la helpilo kiu plibonigas la vivon.

Eric hazarde lernis Esperanton per la zagreba lernilo nomata "Zagreba Metodo" eldonita en Zagrebo en 1983 en lia gepatra kirunda lingvo. La informon pri Esperanto kaj la lernilon alportis al **Burundo** la tiama prezidanto de Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj **Mirejo Grosjean**. Kiam li aŭdis pri "Zagreba Metodo" al li ne estis klare ke Zagrebo estas urbo, li kredis ke tio estas la nomo de la aŭtoro.

Kaj jen li, multajn jarojn poste en **Zagrebo** mem, uzanta Esperanton, kiu helpas agrabligi la monatojn dum li atendas respondojn pri la plej grava entrepreno de sia vivo.

Ni proponis ke **Eric** instruu la suahilan lingvon en **Zagrebo** volontule, ĉar li ne rajtas labori nun dum li havas statuson de la azilpetanto. Ni disponigis al li du pliajn vesperajn programojn en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj". Li prelegis la 11an de januaro pri sia ekiro el **Burundo** kaj la 8an de februaro daŭrigis konatigi nin kun sia lando. Ĉiam aŭskultis lin dudeko da homoj. La 1an de marto li enkonduke instruis la suahilan.

Eric organizis kelkajn siajn samlandanojn troviĝantaj en **Zagrebo** por enkonduki ilin pri Esperanto. Ĉiusabate ilin instruas **Đivo Pulitika**, kun la helpo de **Eric.**

S. Štimec

Mediteranea Esperanto-Semajno ĉe Lazura Marbordo kun Kroatoj

Fotis Monique Preciozo

Francaj esperantistoj la 28an fojon organizis *Mediteranean Esperanto-Semajno* de la 23a de februaro ĝis la 4a de marto 2023 por cento da esperantistoj el **Belgio**, **Hispanio**, **Ukrainio** kaj **Francio**. La organizantinoj **Monique Preciozo** kaj **Christine Graissaguel** investis grandan energion por ke la semajno bele disvolviĝu en la luksa restadejo **Val d' Esquière Les Issambres** ĉe la **Lazura Marbordo**. La seminarianoj lingve perfektiĝis en la kursoj gviditaj de **Zsofia Korody** kaj **Mirejo Grosjean**. **Spomenka Štimec** instruis la Esperantan literaturon al 33 fervore legintaj kursanoj, prezentis sian libron *Hodler en Mostar* kaj la fenomenon de la tradicio de Esperanto kiel protektita nemateria heredaĵo en **Respubliko Kroatio**. Okazis pluraj prelegoj kaj ekskursoj en la bela franca regiono, kie jam februare abunde floris mimoz- kaj migdal-arboj. Aparte valoris la ĉiutaga prelegserio pri **Ukrainio** de **Svitlana Kozarenko**. Francaj kroatlingvaj esperantistoj **Marica** kaj **Vinko Bošnjaković** ankaŭ perfektiĝis lingve en la agrabla sudfranca etoso.

S. Štimec

Kion mi faris por Esperanto?

Mi gvidis kurson en liceo por miaj gelernantoj.

Mi estis kasistino en nia Esperanta grupo en Aix-en-Provence.

Mi gvidis kantadon en Gresillon dum pluraj programoj tie.

En Plena Ilustrita Vortaro mi estis parto de la redakcia teamo pri du fakoj: biologio kaj prahistorio...

... kaj dum 60 jaroj mi mastrumadis en nia hejmo kaj mi zorgis pri kvar niaj infanoj ĉar mia edzo dediĉis sin al Esperanto nur. Feliĉe la infanoj konas Esperanton, kaj eĉ Philippe komencis ĝin praktiki. Li lastatempe fariĝis pensiulo kaj komencis esperantumi en Lisabono dum la Universala Kongreso tie.

Arlette Duc Goninaz (dum la kurso ĉe Mediteranea E-Semajno)

Philippe Duc Goninaz pasigis siajn infanaĝajn feriojn en la Esperanta feriejo en Primošten kaj dum tri someroj li feriis tie kun la gepatroj. Poste li tri fojojn vizitis Kroation sen la gepatroj kaj en 1985 esploris per sia fotilo kio restis de la fama Esperanta somerumejo, post ĝia malmuntado. Jen la foto.

Prelegoj en Kaštela

Esperanto-Societo "Split" kaj Urba Biblioteko Kaštela organizis prelegojn de **Josip Pleadin** "Cent jaroj de esperanto en Split kaj Dalmatio (Dubrovnik, Split, Kaštela)" kaj de **Ivan Špoljarec** "Tradicio de Esperanto en Kroatio". La prelegoj okazis la 16-an de marto 2023 en la Urba muzeo (Nadbiskupski kaštel) en **Kaštel Sućurac**. Ĉeestis dudeko da personoj.

IŠ

Ivan Špoljarec kaj Josip Pleadin dum la prelego. Fotis Vanda Bralić

Prelego de Faruk Islamović pri etaj kroataj riveroj

"Etaj kroataj riveroj" – tio estas la titolo de la prelego de esperantisto **Faruk Islamović** en Esperanto-Societo "Tibor Sekelj" la 8an de marto 2023. Faruk prelegis pri 14 malpli konataj riveroj en **Kroatio**: **Rudo, Grab, Krčić, Krupa, Jadova, Dretulja, Boljunčica, Pazinčica, Slunjčica, Odra, Petrinjčica, Spačva, Bosut.** Pri ĉiu el tiuj riveroj li publikigis artikolon en la revuo *Meridijani*. La prelegon sekvis 29 personoj ĉeeste kaj du per la zoom-programo.

Faruk fariĝis vera esploristo. Aktuale li esploras la kroatan riveron **Sutla**.

F.I.

Faruk dum la prelego. Fotis Saša Đukić

KAJ ONI DIRAS

Kaj oni diras "skribu ĝin, estos pli facile por vi"
Kaj oni diras "diru ĉion, nur ĉion"
Kaj oni diras...
Kaj oni mensogas, ne sciante ke oni mensogas
Oni intencas bone, sed...

Kaj vi rigardas malantaŭen kaj vi scias
Vi ne vere amis
Vi revis pri amo
Vi kantis amon
Vi ploris pri amo
Sed vi ne trovis ĝin

Kaj kiu scias kial grandaj vortoj,
Kaj kiu scias kial ĝojo kaj poste malĝojo,
Vi pensas, ke vivo finiĝas sen tiu, kiu foriras,
Kaj tiam venas alia amo
Kaj tiel ekde la komenco

Kaj ĉe la fino de la vojo vi volas trovi pacon,
mirindan pacon
Estas ĝojo en la lumo, sed ankaŭ en la mallumo
Polvo en la sunradio denove estas miraklo
Varmo sur la vizaĝo, ŝtoneto sur la polmo,
La odoro de poploj ĉe la rivereto,
La odoro de la rivero...

Kaj vi denove vivas,
Kaj vi denove amas Amon kaj Lumon kaj
Esperon,
Kaj la ĉielo denove estas la maro kaj ĉio estas
en sia loko
Kaj ni pluiru...

Snježana Ivanović

Filip Ivančić kroata kontribuanto de Monato

Antaŭ nur iom da tempo **Filip Ivančić**, la kroata tradukisto por la germana kaj rusa lingvoj, eklernis Esperanton en la porkomencanta kurso gvidita de **Đivo Pulitika**. Li aŭdis pri Esperanto dum sia lerneja tempo en la lernilo pri la angla kaj poste en Filozofia fakultato informiĝis pri ĝi pli bone en la kurso pri interlingvistiko gvidita de **D-ro Velimir Piškorec**.

Kaj nun li fariĝis – korespondanto de revuo Monato. Lia unua publikigita artikolo temis pri – maŝintradukadaj problemoj.

Dankon, **Filip**!

S.Š.

20 JAROJ EN NIAJ EJOJ EN VODNIKOVA 9

Kredu aŭ ne kredu jam pasis du jardekoj de kiam ni aĉetis niajn proprajn ejojn en Vodnikova 9! Ŝajnas ke veras ke ĉiu krizo estas ebleco por novaj sukcesoj. Post la milito ne nur nia lando sed ankaŭ nia Ligo estis sufiĉe detruita. Niaj membroj suferis pro la militaj teruraĵoj, kluboj ne funkciis, ni perdis ejojn ktp. Kontraŭ tiaj deprimaj cirkonstancoj ni decidis batali per aktivado. La ideo inviti Universalan Kongreson de Esperanto ŝajnis esti stultaĵo, sed ni faris tion, kaj ree ekhavis memfidon, optimismon, amikecon, kunlaboron... La miraklo ne estis nur ricevi de Universala Esperanto-Asocio la rajton je organizado de UK. Ni ĝin organizis bone. Ni eĉ iom perlaboris ĉar multaj homoj aktiviĝis kaj trovis la antaŭe neimageblajn sponsorojn.

La sumo ne estis granda, sed dank' al saĝaj agoj de unavice **Spomenka Štimec**, **Vjekoslav Morankić**, **Nedjeljko Korasić**, **Anto Mlinar** kaj multaj aliaj, ni sukcesis ricevi kreditojn ĉe la banko kaj ĉe geamikoj kaj aĉetis la ejojn en la centro de la urbo.

Ne estis facile repagi ŝuldojn. Ni havis problemojn sed denove dank' al kunlaboro ni solvis ilin.

Pli ol 900 enpagoj de pli ol 250 homoj estas enkonstruitaj en niajn murojn! Indas tion resumi, rememori pri ĉio okazinta. Faru ni tion la 10 de majo en NIAJ PROPRAJ EJOJ en Vodnikova 9 je la 19a horo. Bonvenon al ĉiuj.

PS. Deko da homoj jam anoncis sian alvenon, ĉu tio signifas ke ni devas jam pensi pri aĉetado de pli granda ejo? Ha, ha, ha...

Judita Rey Hudeček

DUBRAVKA UGREŠIĆ
(1949 – 2023)

En **Amsterdamo**, kie ŝi vivis de post 2001 mortis granda verkistino **Dubravka Ugrešić**, naskita en **Kroatio**. Ŝi naskiĝis en **Kutina** en 1949, studis literaturon kaj la rusan lingvon en **Zagrebo** kaj poste laboris en ties Filozofia fakultato. Ŝi eniris la kroatan literaturon per la infanlibroj *Mali plamen* (*Eta flamo*) 1971, *Filip kaj Srećica* (1978). Sekvis mallongaj rakontoj *Poza za prozu*/*Pozo por prozo* 1978.

Ŝia grava prozo *Štefica Cvek u raljama* života/ *Štefica Cvek en la faŭko de la vivo* (1981) inspiris la samnoman filmon reĝisorita de **Rajko Grlić**.

En 1988 ŝi ricevis gravan jugoslavian literaturan premion de la revuo NIN por *Insistado pri la romano-rivero.*

Dum la milito en **Kroatio** ŝi spertis intelektajn persekutajn pro siaj starpunktoj lige al la disfalo de Jugoslavio kaj kreo de novaj ŝtatoj. Tial ŝi poste publikigis ĉefe eksterlande. En **Kroatio** aperis *Kultura laži* / *La kulturo de mensogo* antipolitikaj eseoj, en du eldonoj. La unua eldono une aperis en la nederlanda. Sekvis *Usona fikciaĵaro*, *Ministerio de la doloro, Muzeo de senkondiĉa kapitulacio, Avinjo Jaga naskis ovon, La vulpo.* Ŝi aŭtoris plurajn filmscenarojn. Ŝi multe tradukis el la rusa kaj interesiĝis ĉefe pri netradiciaj rusaj verkistoj. Kun sia kolego **Aleksandar Flaker** ŝi eldonis *Terminaron de la rusa avangardo.*

En **Kroatio** post ŝia foriro la esearon publikigis la opozicia gazeto *Arkzin*. Esperantigis ĝin en 2000 en **Svidniko** grava pola tradukisto el multaj lingvoj **Tomasz Chmielik** kiel kajero en la serio, La epoko 227.

Ni ricevis la mansukripton de **Tomasz**. Lingve korektis ĝin **Lucija Borčić**. Ni ne havas aŭtorajn rajton publikigi la verkon. Kiu havas la aŭtorrajtojn? Ni interesiĝis ĉe la aŭtor-agentejo sed ankoraŭ ne ricevis respondon.

S. Štimec

Nekrologo

MIRJANA SAKS
(1981 - 2023)

En **Bjelovar** mortis **Mirjana Saks,** membro de la Bjelovara esperantista komunumo. Ŝi naskiĝis la 28an de junio 1981 en **Bjelovar**, kie ŝi finis gimnazion. Ŝia patro **Željko Saks** aktivas aparte la esperanta filatelio. Dum la studado en **Zagrebo** ŝi lernis Esperanton en Studenta Esperanto-Klubo kaj spertis ĝin unue ĉe Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo 2001 kaj poste ĉe la aktivecoj de la bjelovaraj esperantistoj.

Nikolao Hohlov

SUR SLJEME*

Auf die Berge will ich steigen,
Wo die frommen Hütten stehen,
Wo die Brust sich frei erschliessset
Und die freien Lüfte wehen…
H. Heine

Fragoj, framboj, ciklamenoj,
Mentoj, kvastoj malvaj,
Inter alnoj kaj fraksenoj –
Grizaj rokoj kalvaj…
Fringoj, fringeloj,
Pepaj kvereloj…
Zumeta bruo –
Paruo!

En bluo
Torenta fluo,
Sub la pruneloj
Floraj ombreloj,
Trans baretoj valvaj
Saltas akvo per fadenoj
Kun sonoroj salvaj,
Kaj aromas ciklamenoj…

Tra la arbara kampeto luma
Zefiro pasas dolĉe parfuma,
En mozaika, kolora gamo
Sterniĝas foren la panoramo…

Spiri, spiri
La aeron –
Kaj admire la liberon…

Ah, kia ĝojo – tiu vojo tra la val'
Al la lazura, sonvelura pastoral'!

Sljeme* - Monto je 2 km norde de Zagreb, Kroatujo

Nikolao Hohlov - la rifuĝinto kiu veturis de Ukrainio tra Krimeo, Greklando ĝis Kroatio en 1920 kaj eldonis la poemon en la lirika kolekto *La Tajdo* 1928 ĉe Heroldo de Esperanto en Horrem bei Köln (Germanio).
La paruoj, fringoj kaj fringeloj kantas jam cent jarojn, framboj, fragoj, ciklamenoj aromas jam cent jarojn en liaj versoj.

Fotoj: Ivan Špoljarec - Štef